# N I A V O Ĉ O

## Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3ş-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz JULIO – AŬGUSTO 2005


## 64-a HISPANA KONGRESO EN ALCALÁ DE HENARES
7-a ĝis la 10-a de julio

Vidu kompletan programon en aparta folio
Pli da informoj pri la kongreso ĉe:http://www.esperanto-es.net/congreso2005/

Ekde la ĵaŭdo 7-a ĝis la dimanĉo 10-a de julio okazos en Alcalá de Henares la 64a Hispana Kongreso de Esperanto. La kongresejo: Servicio Municipal de Archivo y Biblioteca (Plaza de San Julián, 1) estas tre centra loko, proksime de "Plaza de Cervantes" kaj de la trajn- kaj bus-stacioj. La kongresejo, escepte, estos fermita ĵaŭde vespere, sed okazos programero en la Domo de Cervantes.

Unu el la plej allogaj programeroj estos la astronomia sesio kiu okazos nokte en la kamparo. La Organizo de la Kongreso luis aŭtobuson ekde kaj ĝis Alcalá de Henares por transporti la partoprenantojn senpage. Eventuale tiu aŭtobuso transportos ĝis Madrido tiujn, kiuj ne tranoktos en Alcalá, kvankam estas regula dumnokta aŭtobusa servo Alcalá-Madrido.

La kotizo por gelernantoj (homoj kiuj dum tiu ĉi lernojaro, ekde septembro 2004, lernas la lingvon en iu ajn kurso, ĉu ĉeesta ĉu virtuala) estas 10 eŭroj. Por tion pruvi, necesas atestilo de la instruisto aŭ de la zorganto de la virtuala kurso. Tio donas rajton al la partopreno en ĉiuj aktivaĵoj de la kongreso, sed ne al la ricevo de la materialo kiun oni donacos al la plenrajtaj kongresanoj.

La partoprenantoj de la Alcalá-kongreso ĝuos la eblon partopreni voĉe en filmeto registrata nun en Madrido. Ĝia titolo estas "Hejmo" kaj ĝi estas ludata plene en esperanto. La ludoj de la ĉefroluloj jam estis filmitaj, sed restas ankoraŭ registrenda amasa laŭtlegado de poemo, ĥorece, kvazaŭ litanie. Tiu registrado okazos dum la kongreso de Alcalá far esperantistaj volontuloj; ankoraŭ ne estas certa la ĝusta tago kaj momento kiam registrado realiĝos.

## 4-a CENTJARIĜO DE “EL QUIJOTE”

La jaŭdo 7-a de julio je la 17,00 en la Casa-Museo de Cervantes (Alcalá de Henares) la esperanta versio de Don Kiĥoto, tradukita de Fernando de Diego, estos ricevita en la Domo de Cervantes fare de Director General de Archivos y Bibliotecas.

Dum la Kongreso en Alcalá de Henares okazos ekspozicio kun la desegnoj senditaj de diversaj landoj kaj faritaj de infanoj kaj junuloj kiel kontribuoj ricevitaj por la infana desegno-konkurso “Tia mi vidas Donkiĥoton”. Eblas vidi kelkajn desegnojn en la retpaĝo www.esperanto-es.net/quijote/

## HISPANIO

Miguel Fernández prezentis en Ateneo de Madrid la du lastajn poemarojn de Jorge Camacho: “Saturno” kaj “Celakantoj”. La aŭtoro legis kelkajn poemojn kaj respondis al diversaj demandoj de la ĉeestantoj.

Meze de junio okazis en Guadalajara la Maratón de Cuentos kie unu jaro pli estis reprezentita esperanto. La madridaj esperantistoj aranĝis budon por montri esperantajn librojn por infanoj kaj junuloj. La oficiala programo inkludis kurseton “Enkonduko al esperanto” gvidita de Juan del Castillo. La kurso aperis en la titoloj de la ĵurnalo “Nueva Alcarria”. Ankaŭ Juan “aktoris” rakontante en esperanto la rakonton “La milito de la ĉapelitaj literoj” kiun unue resumis en la hispana.

### LA HOMO KIU DEFIIS BABELON

La biografio de Zamenhof, originale verkita en la franca de Henri Masson kaj René Centassi, tradukita al esperanto en 2001, kaj aktuale tradukata al la korea kaj litova jam estas en la hispana. La libro, tradukita de teamo de Madrida Esperanto-Liceo aperos meze de julio, do, ĝi ne estos disponebla dum la Kongreso: oni disvendos ĝin post la somero.

# 64-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

7a-10a de Julio

Alcalá de Henares. Biblioteca y Archivo de Plaza de San Julián 1

PROGRAMO: PROVIZORA HORARO

## 7-a de Julio, ĴAŬDE

10:00 Akceptado kaj disdonado de dokumentoj.
11:00 Oficiala malfermo.
11:30 Festprelego "El Quijote y sus traducciones al esperanto" (José Antonio del Barrio).
12:00 Kurso de esperanto. (Pedro Hernández)
13:00: Prezentado de filmoj: "Roman Dobrzynski: "Sieĝoj de Malborko" (Varsovio 2004) kaj "Valencio en fajro" (Varsovio 2004)." (Augusto Casquero)
13:00 Traduk-ateliero. (Liven Dek)
14:00 Manĝo-pauzo.

17:00 Muzeo-Domo de Cervantes. Vizito kaj donacado de Kiĥoto.

## 8-a de Julio VENDREDE

10:00 Prelego: "1905: la revolucio de Einstein en Fiziko" (Manuel Pancorbo)
10:00 Traduk-ateliero. (Liven Dek)
11:00 Prelego: "Gigantoj kaj muelejoj de Esperantujo" (Jorge Camacho)
12:00 Prelego: "El Quijote imaginado" (Amelia Fernández. Malferma al la ĝenerala publiko)
13:00 Prezentado de libroj: Lastaj eldonoj de Barcelona Esperanto-Centro: "Esperanto en Katalunio", de Antonio Marco Botella. "Makako kaj Antono", de Alfredo Gómez Cerdá, tradukita de Pedro Ullate. (Liven Dek kaj Salvador Aragay).
14:00 Manĝo-paŭzo.

17:00 Ateliero: "Enkonduko en ornitologion" (Félix Lobo)
17:00 Kurso de esperanto. (Pedro Hernández)
18:00 Prelego: "Sancho Panza legas la horon en la ĉielo: pri-astronomiaj komentoj al la 20a ĉapitro de la unua parto de "Don Quijote"." (David Galadí).
19:30 Prezentado: "Kosmologia Suito". (Pedro Vilarroig. Malferma al la ĝenerala publiko).
21:00: "Stelrigardada astronomia nokto" (David Galadí)

9-a de Julio, SABATE

10:00 Prelego: "Naskiĝo de lingvo: de Bialistoko al Bulonjo." (Darío Rodríguez)
10:00 Traduk-ateliero. (Liven Dek)
11:00 Malfermo de Libro-Servo
11:00 Prezentado de animacia filmeto: "Donkiĥoto kaj la malkomunikiga sorĉo" (José Rodríguez)
11:00 Kunsido de SATeH.
12:00 Prezentado: "Projekto Kiĥoto-2005." (Miguel Ángel Sancho)
12:00 Kunsido pri ILEI (Gvidota de Augusto Casquero)
12:00 Kurseto por progresantoj: "Dubosolvado" (Antonio Valén)
13:00 Prezentado de libroj: "Saturno" kaj "Celakantoj": du poemaroj de Jorge Camacho, (Jorge Camacho)
14:00 Fermo de Libro-Servo.
14:00 Manĝo-paŭzo.

17:00 Ateliero: "Enkonduko en eskapismon". (David Guerrero)
17:00 Kurso de esperanto. (Pedro Hernández)
17:00 Estrarkunsido.
18:00 Prezentado de filmo: "La pedalaŭto". (Subtitolita en esperanto)
19:30 Surpriza programero. (José Antonio del Barrio)

10-a de Julio DIMANĈE

10:00 Ĝenerala kunsido de HEF-anoj.
11:00 Malfermo de Libro-Servo
11:00 Prezentado de Junaj Esperantaj Aktivaĵoj. (HEJS. Malferma al la ĝenerala publiko.)
12:00 Omaĝo al Fernando de Diego.
13:00 Oficiala fermo.
14:00 Fermo de Libro-Servo
14:00 Manĝo-paŭzo.

17:00 Turisma konatiĝo kun Alcalá de Henares.

Ekspozicioj:
(Malfermaj al la ĝenerala publiko de la 1ª ĝis la 15ª de julio)

TIA MI VIDAS DONKIĤOTON: Kontribuoj ricevitaj por la infana desegno-konkurso.

ESPERANTO EN LITERATURO KAJ LITERATURO EN ESPERANTO

NOVA LIBRO

"El hombre que desafió a Babel"

Hispana versio de la biografio de Zamenfof verkita de Masson/Centassi tradukita far membroj de Madrida Esperanto-Liceo. La prezo de la libro estas 20 eŭroj sed por vendoj ĜIS KAJ DUM la HEF-Kongreso, Madrida Esperanto-Liceo havas grandan oferton:

po 23 eŭroj vi ricevos "El hombre que desafió a Babel" kaj "Nuevo Método de Esperanto"; la prezo inkludas sendokoston al Hispanio.

Antaŭpago necese al la konto je la nomo de Madrida Esperanto Liceo ĉe Banco Sabadell/Atlántico numero 0081/7110/98/0001266730

## Oficiala partopreno en Eŭropa konferenco

Laŭ komisio de KCE prof. Giorgio Silfer partoprenis kiel oficiala delegito en kategorio "observanto" en la internacia konferenco pri lingvotestado, kiun organizis en Berlino 19-21 majo 2005 la asocio deputita fare de la Konsilio de Eŭropo. La pasintan novembron la sama asocio akceptis ke KCE reprezentas esperanton, same kiel Goethe Institut la germanan, Alliance Française la francan ktp por la tuta Eŭropo. La konferenco (dua, post 2001 en Barcelono) estis altnivela. Intervenis precipe funkciuloj de ministerioj, tamen kun filologia preparo. Prof. Silfer diskrete rilatadis al diversaj, ĉefe al franclingvanoj (kiel Esperanta Civitano, li havas la devon uzi la francan kiel diplomatian lingvon, se ne eblas esperanto); nenie li trafis negativan sintenon: ĉiuj estis interesataj pri esperanto kaj trovis tion normala.

Faka komisiono ĉe KCE estas nun ellaboranta la adekvatan testaron kaj la oportunajn rimedojn por lingvoekzamenado, ankaŭ telematika. La unuaj rezultoj de ĉi tiu laboro estos prezentitaj al la partoprenantoj en la Esperantologia Fakultato de KCE (2-14 aŭgusto 2005).

## NIA LITERATURO EN LA FOKUSO DE LA PEN-MONDKONGRESO

Neniam la esperanto-literaturo ricevis tiel grandan atenton dum la ĉiujara verkista mondkongreso, ĉi-foje en Bledo (Slovenio) 14-21 junio 2005. Unuafoje du esperanto-verkistoj estis oficiale invititaj prelegi: la Prezidanto kaj Vicprezidanto de la Esperanta PEN. Aparte sukcesa estis la prelego de prof. Silfer, kiun aŭskultis gekolegoj el deko da PEN-centroj, interalie la franca, galega, germanlingva eksterlande, hungara, itala, kroata, slovena kaj svisitala. Tre granda estis la intereso en la Virin-Komisiono, kie oni laŭdis la kontribuon de niaj verkistinoj al la realigo de la nova, admirata revuo en esperanto "Femina".

La intereso konkretiĝis en la anonco pri invito al PEN Internacia mondkongresi en Ĉaŭdefono, en 2009. Dum tiu kongreso, organizota de niaj verkistoj, esperanto estos oficiala laborlingvo. La kongreso nature donos la okazon prezenti nian literaturon ankaŭ per teatro kaj per ekspozicio.

## ĜIS ALCALÁ DE HENARES!!!

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid



# *Don Quijote habla esperanto…*
# *…y tú, ¿todavía no?*

Con ocasión del 64º **Congreso Español de Esperanto** que con el tema “Don Quijote habla esperanto” se celebrará, del 7 al 10 de julio, en el **Servicio Municipal de Archivo y Biblioteca** (Plaza de San Julián, 1) de Alcalá de Henares, la Federación Española de Esperanto ofrece un **CURSO INTENSIVO DE ESPERANTO GRATUITO** para los ciudadanos de Alcalá.

El curso se desarrollará según el siguiente horario:

Jueves, 7 de julio, de 12:00 a 14:00 horas.
Viernes, 8 de julio, de 17:00 a 19:00 horas.
Sábado, 9 de julio, de 17:00 a 19:00 horas.

Puedes **inscribirte aquí mismo**, o enviando un **correo electrónico** a:
admin@esperanto-es.net

También puedes participar gratuitamente en algunas de las actividades del congreso:

Jueves 7, a las 11:30 h. **Conferencia** en español: **“El Quijote y sus traducciones al esperanto”**, por José Antonio del Barrio, director de la Fundación Esperanto.

Viernes 8, a las 12:00 h. **Conferencia** en español: **“El Quijote imaginado”**, por Amelia Fernández, profesora de la Universidad Autónoma de Madrid.

Viernes 8, a las 19:30 h. **Audiovisual**: **“La suite Cosmológica”**, de Pedro Vilarroig, Presidente de la Federación Coral de Madrid.

Domingo 10, a las 11:00 h. **Presentación de actividades juveniles mediante el esperanto**. **¡TODOS LOS JÓVENES DE ALCALÁ ESTÁIS INVITADOS!**

Federación Española de Esperanto.
admin@esperanto-es.net
www.esperanto-es.net/congreso2005

Servicio Municipal de Archivo y Biblioteca.
Plaza de San Julián, 1

FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO

QVIXOTE IV CENTENARIO